

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



MANRESA
XVIII KATALUNA ESPERANTO-KONGRESO
XVII INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ
31 MAJO, 1-2 JUNIO 1936

JANUARO-FEBRUARO 1936

N-ROJ 224-225

20 - 50 %

malaltigis la prezojn de siaj eldonaĵoj ekde l'januaro ĉijara.

LITERATURA MONDO

pro nova valutopolitiko de la Hungara Nacia Banko kaj per tio ankaŭ la prezoj de ĝiaj neserie aĉetataj libroj apartenas al la plej malaltaj en nia literaturo. Jen kelkaj ekzemploj:

Julio Baghy: Viktimoj svfr. 2,50; anstataŭ svfr. 5.

Enciklopedio de Esperanto I-II broŝurita, ilustrita svfr. 18; anstataŭ svfr. 30.

Plena Gramatiko de Esperanto, svfr. 6; anstataŭ 8.

Tiuj nunaj prezoj senvalidigas ĝenerale ĉiujn favorajn prezojn, konstatitajn ĝis nun por kurzsuferaĵantaj landoj. Tamen, se tiuj antaŭaj prezoj estis ie pli malaltaj, ili ne estas plialtigataj.

Por ne kauzi ĉagrenon, ni repagas al ĉiu mendinto, kiu faris sian mendon el niaj libroj post l'januaro la diferencon inter la malnova kaj nova prezoj. Bonvolu skribi pri tio al via mendloko.

Detalan liston pri la malaltigo sendas al vi volonte la eldonejo Literatura Mondo, Hungarujo, Budapest. IX. Mester-u. 53., kaj ĉiuj libristoj.

PERFUMERIA ORIENT

DE J CASANOVES

PROVENÇA, 190

(ENTRE MUNTANER I CASANOVA)

La més assortida en Cremes,
Sabons, Colònies, Locions,
Esmalts, Pólvores, Brillan-
tina, etc.

Colònia des de 2'50 ptes. litre

Articles per a senyor

Objectes per a regal

Jocs de tocador

Sérvei de manicura

Als esperantistes 10 % de rebaixa



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj
Provegzemplero: 1 resp.

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA

OFICIALA ANGULO

Al ĉiuj hispanaj samideanoj!

La «Kataluna Esperantista Federacio», fondita okaze de la «Universala Esperanto-Kongreso» en Barceloná, en 1909, jam de antaŭ 25 jaroj laboras por Esperanto.

Ĝia regularo ĉiam akcentis, ke ĝi disvolviĝos ne nur en la malgranda princolando Katalunujo — kiu princolando, kune kun ĝiaj kvar provincoj, jam ne plu ekzistas—, sed ĝenerale en ĉiuj katalunlingvaj teritorioj, tio estas: en Katalunujo, en Valencio kaj en la Balearaj Insuloj. Ni certe okazigis Kongresojn de K. E. F. ne nur en Katalunujo, sed ankaŭ en Valencio kaj en la Balearaj Insuloj. La katalunlingvaj lernolibroj eldonitaj de K. E. F. — «Kataluna Ŝlosilo», «Primer Manual» kaj «Curs Complet» — disvendiĝas ne nur en Katalunujo, sed ankaŭ tra la tuta katalunlingva teritorio. La verko «Kataluna Antologio», eldonita jam dufoje dank' al la helpo de K. E. F., entenas *verkistojn* ne nur el malgranda Katalunujo, sed el ĉiuj regionoj, kie la kataluna lingvo estas ankoraŭ nuntempe parolata.

La Kongresoj de K. E. F., kun la tradicia bela festo de la «Internacia Floraj Ludoj», kutime estis okazigataj ĉiujare dum la Pentekostaj festotagoj; kaj en junio 1935, en Ripoll, oni

ankaŭ decidis organizi nian venontan Kongreson dum Pentekosto 1936 en la urbo Tarragona aŭ Puigcerdá. La Komitato, esplorinte la eblojn pri tio, decidis okazigi nian Kongreson 1936 ne en iu el ambaŭ urboj, sed en Manresa, kies esperantistoj estis farintaj oficialan inviton.

Nu, kun la plej granda surprizo ni sciigis, ke «Hispana Esperanto-Asocio» intencas okazigi Kongreson en Barcelono, en la sama dato kiam okazos kataluna Kongreso en Manresa.

Ĉu tio estas lojala ago? Ni kredas, ke ne.

Sed ni tuj klarigu al vi la aferon: tia stranga koincido de datoj ne obeas al vera decido de la Madridaj direktantoj de H. E. A., nek al la ĝenerala decido de la «H. E. A.»-anoj, sed al hontinda makiavela plano de la ĉiamaj malamikoj de K. E. F., tio estas, de kelkaj *samideanoj* loĝantaj en Barcelono, kiuj konstante baras, senkreditigas, malhelpas kaj neas la fervoran poresperantan agadon de K. E. F.

Tiuj eternaj malamikoj de nia Kataluna Federacio estas la inspirintoj aŭ inspirantoj de du monstraj Esperanto-societoj —antaŭe «Fajro», nun «Zamenhof-Instituto»—, kiuj ne estas ja simplaj Esperanto-grupoj, demokratie gvidataj, kiel ĉiuj aliaj grupoj en Katalunujo kaj en la cetera Hispanujo, sed tute diktatorecaj organismoj, kiuj akceptas nur limigitan nombron da aktivaj membroj —dek-du aŭ dek-kvin—, por ke la mastroj de tiaj ŝajne grupoj povu, senkontrole kaj senpune, blufi, paradi kaj patosi, kaj mirigi la mondon per la vastaj pretendoj de ilia megalomanio.

En la daŭro de 25 jaroj, neniam K. E. F. kuraĝis organizi Kongreson en Barcelono, ĉar ni estas konvinkitaj, ke malgrava kongreseto —malgrava proporcio al la graveco de la urbo— estos nur fiasko kaj malbono por Esperanto.

Kaj nun H. E. A. —pli bone: la Barcelonaj malamikoj de K. E. F., kiuj trompis la «H. E. A.»-anojn—anoncas Kongreson en Barcelono por Pentekosto 1936, ĝuste en la samaj tagoj kiam okazos en Manresa la Kongreso de «Kataluna Esperantista Federacio» kaj la festo de la «Internaciaj Floraj Ludoj».

En artikolo aperinta sur la paĝoj de «Hispana Esperanta Gazeto», oni celas pravigi tian nelojalan agon, dirante, ke K. E. F. ankaŭ okazigis Kongresojn *ekster sia propra teritorio*, tio estas, en Valencio kaj en la Balearaj Insuloj. Ni respondu: la urbo Vinaroç (en Valencio) kaj la urboj Palma de Mallorca kaj Sóller (en la Balearaj Insuloj) estas plene katalunlingvaj kaj sekve apartenas al nia propra teritorio.

Sed ne temas sole pri tio ĉi. Temas ĉefe pri la koincido de

datoj. Temas pri la neprudenta ago okazigi Kongreson en Barcelono, kiu estos nur ridindigo de nia Esperanto-movado. Ni ne pretendas bari la vojon al tiuj, kiuj estas veraj samideanoj; sed... ĉu estas samideanoj tiuj, kiuj volas starigi iun publikan konkuron inter la kataluna kaj la hispana kongresoj?

Ni opinias, ke H. E. A., volante okazigi Kongreson en Barcelono, devus almenaŭ sin turni al K. E. F., sciigante ĝin pri tia intenco kaj petante kunlaboron. Sed ĝi tute ne faris tion. DO LA KULPO KE LA ESPERANTISTOJ, PREDIKANTAJ LA INTERNAN IDEON, APERAS DISIGITAJ ANTAŬ LA PUBLIKO, APARTENAS NUR AL H. E. A. aŭ al la Barcelonaj instigantoj de H. E. A.

* * *

Ni ne volas fari historion pri kelkaj malagrablaj spertoj travivitaj de K. E. F.: inter aliaj, monpuno de 500 pesetoj, kaj registara malpermeso ke ĝi nomu sin «kataluna» kaj perforta devigo ke ĝi aliĝu al la hispana asocio. Ni diru nur, ke ne NI, sed niaj malamikoj, faris «politikon». Kaj jen alia pruvo de ilia *senpolitika* politiko: kontraŭstari al nia Manresa Kongreso per alia Barcelona Kongreso, kvazaŭ la sukceso de nia solena kunveno ne estus jam plene certigita, dank' al la laboremo de la Loka Komitato kaj dank' al la festo de la Internaciaj Floraj Ludoj, kiuj fariĝas pli kaj pli konataj kaj ŝatataj.

Niaj senhontaj malamikoj volis malsukcesigi nian Kongreson, oponente al ĝi alian samtempan. Nu: ni invitas ĉiujn hispanajn esperantistojn partopreni la Kongreson de K. E. F. en Manresa. La aliĝo, kaj la rajto ĉeesti ĉiujn solenaĵojn, estas tute senpaga. Vi vidus, kiamaniere ni akceptos vin; vi konstatos, ke ni serioze laboras por Esperanto; kaj vi ĝuos la poezian feston, la Florajn Ludojn, kio estas io ne kataluna, sed universala, apartenanta al la tuta esperantistaro kaj emociiganta ĉiujn spiritajn kaj estetikemajn homojn... escepte tiujn, kiuj eĉ kontraŭ nia Festo de l' Poezio malame bojas!

Kie jukas, tie ni ĝratas

En la januara numero de «Hispana Esperanta-Gazeto», s-ro Mangada publikigas dupaĝan artikoleon sub titolo «Tute sincere kaj lojale» kiel respondon al kelkaj asertoj aperintaj en nia lasta numero. Ni bone konas depost multaj jaroj la sincerecon kaj lojalecon de s-ro Mangada kaj tial ni ne volas akcepti polemikon kun li.



Manresa atendas vin!

La Organiza Komitato, str. Piques, 1, invitas ĉiujn katalunajn esperantistojn ĝenerale partopreni la nunjaran Kongreson kaj la tradiciajn Florajn Ludojn.

Kvankam ni havas la certecon, ke vi ĉiuj kun entuziasmo respondos al nia invito, ni volas instigi vin labori senhalte en la propagando de la Kongreso, kiu malfermos vastajn kampojn al nia loka agado kaj al la tuta kataluna movado speciale. La preparaj laboroj por havigi al ĉiuj kongresanoj agrablan restadon en la kongresurbo, glate disvolviĝas kaj ĉio antaŭvidigas eksterordinaran sukceson. La plej kontentiga respondo al nia penado povas esti la multnombra partopreno de esperantistoj. Ĉiuj grupoj konstante propagandu, organizu karavanojn, instigu ĉiujn membrojn al partopreno, alportu al Manresa vian neestingeblan fajron kaj tiam la sukceso estos plena kaj absoluta.

* * *

Kongresafiŝo. — Post kelkaj tagoj ni dissendos al ĉiuj grupoj diverskoloran kongresafiŝon, kiu, ni esperas, plaĉos al ĉiuj. Interesatoj turnu sin al la O. K.

* * *

Kongresmarkoj. — Estas eldonitaj dukoloraj kongresmarkoj kun tre bela desegnaĵo de nia artisto s-no Comella. Tiuj markoj estas tre taŭgaj por la propagando kaj tre malkaraj, 100 markoj kostas 0,80 ptojn. Mendu ilin al la eldoninto, Sro. Ferran Montserrat, str. Provença, 75, 2-a, Barcelona, aŭ al via loka grupo al kiu provizo estas sendita.

* * *

Kongreskartoj. — Sur la kovrilpaĝo ni publikigas la desegnaĵon, kiun ni uzis por la kongresaj kartoj. Uzu ilin por via korespondado kaj per tio vi efike propagandos nian Kongreson. La eldonon ni ŝuldas al s-no Montserrat, kiu prizorgas la disvendadon.

XVII INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Eksterordinaraj premioj

X.—Premio de Dro. Antoni Orriols, Arcipestro, 50 pesetoj. Temo: «Esperanto, la plej taŭga divastigilo de Kristana Doktrino».

XI.—Premio de Sro. Josep M.^a Servitje, Urbestro, 50 pesetoj. Temo: «Laŭvola».

XII.—Premio de «Associació Ram d'Alimentació i Drogueria» de Manresa, 50 pesetoj. Temo: «Esperanto, internacia interligilo de Komercaj asocioj».

XIII.—Premio de «Joventut Carlista Manresana», 50 pesetoj. Temo: «Esperanto, Patrujo kaj Tradicio».

XIV.—Premio de «Casal Regionalista» Manresa, 50 pesetoj. Temo: «Laŭvola».

XV.—Premio de Sro. Marian Calviño Gras, Advokato, 50 pesetoj. Temo: «Laŭvola».

XVI.—Premio de «Centre Excursionista de la Comarca de Bages», 25 pesetoj. Temo: «Laŭvola».

XVII.—Premio de «Literatura Mondo» el Budapest. Kolekto de priartaj verkoj: «Pri la Moderna Arto», «La Pentroarto en Malnova Hungarujo» kaj «Arthistorio» (unua kaj dua volumoj)). Temo: «Efiko de la belartoj sur la homan animon».

XVIII.—Premio de «Literatura Mondo», jarkolekto de la gazeto «Literatura Mondo» 1936. Temo: «Laŭvola».

XIX.—Premio de «Literatura Mondo», la verkoj «Eterna Bukedo» kaj «Tragedio de l'Homo» al la plej bela tradukita poemo.

XX.—Premio de la Urbestro de Granollers, 50 pesetoj. Temo: «Laŭvola».

XXI.—Premio de la Urbestro de Sabadell, 50 pesetoj. Temo: «Laŭvola».

XXII.—Premio de «Esperanta Grupo», de Vic, argenta arta plato. Temo: «Verko priskribanta katalunan folkloran temon.»

Aliaj premioj estas al ni promesitaj kaj tial nur en la proksima numero ni povos publikigi la lastan liston de premioj. Ni ĝojas, ke niaj verkistoj povos esti juste premiitaj.

* * *

Listo de verkoj ricevataj: Verko n.^o 1, devizo «Denove»; n.^o 2, «Homo 1935»; n.^o 3, «Hesperis»; n.^o 4, «Malforta karno»; n.^o 5, «Preterpasanto»; n.^o 6, «Aminto»; n.^o 7, «Flandra Esperantisto»; n.^o 8, «Mielabelo»; n.^o 9, «Versaĵo kantanta Amon»; n.^o 10, «Il Bacio»; n.^o 11, «Ankoraŭ unu fojon»; n.^o 12, «Tezeo»; n.^o 13, «Paolo»; numero 14, «Risum teneatis?».

Daŭriga listo venos en proksima numero.

EDUARD CAPDEVILA, Sekretario.

ĈU KULPO AŬ SORTO?

(Daŭrigo)

—Ho, malfeliĉo renkontos min. En mia teo naĝas tri te-eroj... ho, kaj ankaŭ vin, Aleĉjo, ankaŭ en la via estas tri.

—Ne estu superstiĉa, mia kolombineto, memoru la proverbon Ĉiu forĝas sian sorton. Ni forĝis kaj forĝos la nian... Ĉu ne?

—Eble. Sed mi povas respondi al vi ankaŭ per proverbo: Venkas ne forto, venkas la sorto.

La societo debatis kaj babilis, ŝercis kaj ridis, ludis kaj amindumis. Forgesita estis la ekstera pafado ja eĉ la tri malfeliĉaj te-eroj. Tamen io ne eldirebla sed bono sentebla kaŭzis ke la societo ĝuis ĉion ĉi ne tute reale, kvazaŭ ĝi timus jam subitan ne antaŭvideblan finon. Finon, de kio? Kaj kial?... Burga societo pereonta per ondo de l' bolŝevismo. Oni skribis januaron de l' jaro 1920.

Post la tetrinkado dispartigis la societo en grupojn: gejunulara, virina kaj vira. La viroj sidigis laŭkutime al tablo en la angulo, kie la tuta muro estis travarmigita per la enmura forno. Sed la ŝaktabulo kaj la figuroj kuŝantaj sur la tablo restis hodiaŭ ne tuŝitaj.

—Ĉu vi legis la hodiaŭan bultenon? demandis mallaŭte la mastro por ne maltrankviligi la ceterajn amuzigantajn gastojn.

—Ĉu bulteno? Ĉu nomaron de mortpafitoj oni povas nomi bulteno? Nomo, baptonomo, profesio kaj la rimarkigo: mortpafita pro kontraŭ-revolucio aŭ spekulacio. Nenio plu. Fi... bela bulteno.

—Ne tiel laŭte, amiko, eĉ la muroj havas nuntempe orelojn.

—Nian butikiston oni mortpafis, ĉar li vendis funton da butero kun du-rubla profito. Jen «spekulacio»! Kaj la riĉan viandiston de l' Poŝt-strato, ĉar li aĉetis caran monon, ne fidante al la falĉileto kaj martelo. Jen «kontraŭ-revolucio».

—Hieraŭ mi renkontis konaton, kies frato estis arestita. Mi opiniis, ke li estos konsternita, kaj demandis lin, kiel statas la afero de lia frato. Ho ne demandu min, kiel kolere li serpondis: Se mia frato vin tiom interesas, bonvolu viziti lin en la malliberejo, sed bone atentu, ke vi retrovu la vojon returnen.

—Mirinde! La du fratoj ja neniam malpacigis.

—Timo! Timo! Timo, mi diras! Frato ne kuraĝas viziti fraton, edzino, edzon, patro, filon. Kiel leprulon oni evitas ĉiun arestiton.

—Helpi oni ne povas kaj oni timas, ke oni mem povus fariĝi viktimo de l' ĝenerala suspektemo... pro troa simpatio al «mal-amiko de l' revolucio».

—Aleĉjo, ni iru hejmen!

Laŭte kaj malagrabla traflugis la vortoj la ĉambron. Kiel ŝirata tablotuko ili vipis la orelojn. Kio okazis? La viroj ekrigardis en la direkto al tablo, kie la gejunularo amuziĝis per rondo-ludo. Malagrabla silento metiĝis sur ĉies buŝo, sur kiu ŝtoniĝis gaja rideto.

Estis Anjuta, ardanta pro ĵaluzo. Abrupte, ne tiel ceremonie kiel ordinare, ŝi adiaŭis la mastrinon kaj la ceterajn gastojn. Nur ŝura, ŝia amikino, restis sen adiaŭ. Ŝura provis saviĝi el tiu ĉi malagrabla situacio per moka rideto. Ŝi ne sukcesis. Ŝia rideto estis stulta. Sed ĝuste tiu ĉi malsprita rideto vekis kompaton kaj reakiris al ŝi la simpatio de l' juna societo. Nu fine, tiel oni demandis sin, kio okazis? Ŝura kisis junan viron elektinte tiucele ĝuste Aleksandron. Ridinde! Ĉu ŝi ne pravis laŭ la regularo de l' ludo? Se Anjuta ne volis submetiĝi al la regularo, kial ŝi ne iris inter la virinojn kaj Aleksandron ne forsendis al la viroj? Iliaj okuloj parolis klaran lingvon kvankam la buŝoj restis mutaj. Anjuta bone komprenis ĝin per sia delikata virina instinkto. Ŝia kolero forvaporigis kaj ŝanĝiĝis en obstina spitego, kiu ordinare des pli kreskas, ju pli oni sentas ŝanceliĝi sub la piedoj la bazon, kiun oni opiniis justa. Ŝi forlasis la ĉambron. Ŝia edzo, embarasita, sekvis ŝin. La mastro akompanis ilin ĝis la sojlo de l' domo:

—Ne malpacigu, kolombetoj... eĥ malĝoja fariĝis la vivo... vere, ne estas la tempo por malpacigi... venu morgaŭ tiel gajaj kiel hodiaŭ... kontentan nokton, kolombetoj.

—Dankon pro via invito kaj pro viaj bonaj vortoj... ni venos... Restu sana! Bonan nokton!

Denove neĝo kraketis sub iliaj feltobotoj. Kelkajn dekojn da paŝoj ili iris mutaj.

—Anjuta, bone komprenu min, mi ne volas kulpigi vin, sed vi ne estas prava agante tiel.

—Do, se mi tolerus, ke tiu stulta ansero publike kisu vin, mi estus prava, ĉu ne?

—Jes, tiel postulas la regularo de l'ludo. Se ĝi estas maloportuna al vi, bone, ni tute ne ludu plu.

—Ĉu mi do iru jam de nun inter la virinojn... iliaj interesoj ankoraŭ ne fariĝis la miaj.

—Bone. Ni restu inter la gejunularo, sed tiam... Ne, Anjuta, ŝura-n ne timu. Entute vi devas timi neniun virinon, ĉar

nur vin mi amas, nur vin. Ĉu vi aŭdas, Anjuta? Li parolis pardoneme, ĉar ŝia ĵaluzo flatis lin.

—Alie parolas via buŝo, alie viaj okuloj.

—Vi estas maljusta. Ĵaluzo parolas el vi. Jen ĉio.

—Pro kio mi estus ĵaluzo? Ĉu pro tiu stulta ansero?

—Mi ripetas, vi estas maljusta kaj mi ne toleros viajn insultaĵojn. Mi ĵuras al vi, ke vi ĵaluzas senkaŭze... kutimaj ĝentilaĵoj, nenio plu. Ŝia ĵaluzo ne plu flatis lin.

—Kutimaj ĝentilaĵoj, ŝi mokvoĉe ripetis. Por ke vi ne havu okazon ĝentilumi, ni restos morgaŭ hejme.

—Mi promesis, do ni iros, li diris decide.

—Mi ne iros.

—Agu laŭ via bontrovo, sed mi iros.

—Ankaŭ vi ne iros. Ho mi vidas ĝis en vian malfidelan animon, vi perfida aĉulo. Ŝi bone sentis, ke tion ĉi ŝi ne devis diri, ia eĉ ne volis diri. Sed kiu elĝvidos ŝin el tiu ĉi labirinto? Aleksandro ekhaltis. La varma sango torentis de l'koro al kapo kaj metiĝis inter lin kaj lian prudenton. Kolerege li levis la pugnon kaj kriis:

—Mi iros.

—Ne minacu, vian pugnon mi ne timas... vi ne iros. Nur lastmomente ŝi evitis la falantan pugnon kaj forkuris en la en la malluman nokton. Li ŝovis siajn manojn en la vastajn manikojn de sia pelto kaj postrigardis ŝian malaperantan figuron. La saliko amariĝis en lia buŝo. Eh!, estas honto tiel kondukti, li pensis, kondukti kiel kamparano... kiel muĵiko¹. Li elkraĉis la amarajon. La malproksimiĝanta Anjuta fantome ankoraŭ foje reaparis orumita en la flava lumkonuso ĵetata de l'lampo straten... poste ŝin forglutis la faŭko de l'nokto. Aleksandro staris senmove kun larĝe malfermitaj okuloj kaj vidis nenion. Li vidis nur la kristale radiantajn neĝerojn, kiuj dancis ĉirkaŭ la stratlampo kiel petolemaj muŝetoj dum varmaj majaj vesperoj. Kiom ofte li plezure observis ilin. Sed tiuj ĉi neĝeroj, ŝajnis, ke ili mokas lian rigidecon per sia movemo kaj ludemo:

—Ni dancas kaj ĝojas, mallonga estas nia vivo, morgaŭ ni kuŝos sur la strato, malpuraj kaj tretitaj. Revoku ŝin, homo miopa, ŝi atendas tion, revoku ŝin kaj ĝoju kaj dancu kiel ni... via vivo ne estas pli longa ol la nia... Ĉiu forĝas sian sorton.

—Jes, revoku ŝin, revoku ŝin, eĥis ia interna voĉo.

(1) Muĵiko - rusa kamparano.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

de

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

kaj de la

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



Kolekto 1933-1935

Numeroj 192-223

TABELO DE LA ENHAVO

- Alberic Jofrè, S.: Sekretaria parolado, p. 4; XXV Universala Kongreso de Esperanto, p. 84; Parolado ĉe la XVII Kataluna Esp-Kongreso, p. 242.
- Alberic, Josep: Sekretaria raporto al la XVI Kataluna Esp.-Kongreso, p. 64.
- Akademio kaj Lingva Komitato: p. 106, 119, 182.
- Al nekredemuloj: p. 16.
- Assemblea general de socis: p. 114, 129.
- Banet, Josep: XIV Kongreso de SAT en Valencio: p. 169.
- Berger, Joseph: Monumento al nekonata esperantisto, p. 151; Sankta Nikolao volis modernigi: p. 237.
- Bibliografio: p. 160, 172, 189, 206, 220, 276; J. G. C.: p. 46, 74, 92, 109, 125, 140, 218; Delfi Dalmau, p. 277; D. G.: p. 293; Neniu: p. 292, 295; Marian Solà: p. 293.
- Briggs, Louise: La ŝnurtiro, (trad. el Francis): p. 115, 135, 148.
- Cabeza, Ramon: Catalunya i el XXVI Congrès Universal d'Esperanto celebrat a Estocolm: p. 162; La leciono sur la ŝipo: p. 236.
- Capdevila, Eduard: Del Congrès de Vinaroç al de Vendrell, p. 31.
- Carreira, Saldanha: Parolado ĉe la XVI Int. Floraj Ludoj, p. 252.
- XVII Congrès Català d'Esperanto: p. 114.
- Ĉemetodaj Kursoj: p. 2.
- Dalmau, Delfi: Esperanto kaj la naciaj lingvoj: p. 43; El «Curs Complet»: p. 168; Ne malsagiĝu: p. 181; Esperanto en la praktikon: p. 200; Poliglotisme i Poliglotitis: p. 210; Partopreno esperantista en la teknikajn kongresojn: p. 236; La XIII Kongreso de la Pen-klubo en Barcelona: p. 279; Francaj kaj japanaj pioniroj: p. 286.
- D. D.: Benson Universala Esp. Metodo: p. 41.

- Dietterle, Dr.: Mi serĉas tradukantojn: p. 37.
Domènech, Artur: Parolado: p. 88.
Edca: Tra la esp. gazetaro: p. 112.
Enlanda Kroniko: p. 47, 79, 95, 144, 160, 174, 191, 207,
221, 240, 295.
Estona Antologio: p. 22.
Fischer-Galati, Enriko: Evoluo jes, sed ne evoluigo: p. 44.
Grava Esperanta Folkloro Festo: p. 78.
Grau Casas, Jaume: En l'album d'una noia (trad. el Kalocsay): p. 30; Sur ekzemplero de «Kataluna Antologio» dediĉita al K. de Kalocsay: p. 42; Amor cal (trad. el Ivan Vazov): p. 45; Sekretaria raporto pri la XV Int. Floraj Ludoj: p. 54; A la senyoreta Regina Riera: p. 73; Klarigo: p. 78; Estis reĝ' en mia lando (trad. el Bedós: p. 139.
Gili Norta, Joan: Raporto pri la XVI Int. Floraj Ludoj: p. 245.
Gisbert Garcia, Rafael: Raporto pri la laboraj kunsidoj de la XVII Kataluna Esp. Kongreso, p. 262.
Grankamp-Kornfeld S. T.: La popola kanto en Japanujo; p. 152.
Herp, Jaume: Advertiment: p. 176.
Interkonsento de Kolonjo: p. 104.
XIV Int. Floraj Ludoj: Raporto: p. 3.
XV Int. Floraj Ludoj: Verkoj ricevitaj: p. 2, 28, 42; Listo de premioj: p. 27; Verdikto: p. 38.
XVI Int. Floraj Ludoj: p. 113; Alvoko: p. 99, 179; Listo de premioj: p. 134, 147, 171; Ricevitaj verkoj: p. 134, 214; Verdikto: p. 229; Raporto: p. 245.
XVII Int. Floraj Ludoj: Alvoko: p. 266; Listo de premioj: p. 283.
Internacia ĵurnalo enkondukas Esp.: p. 192.
Internacia Konferenco en Vieno: p. 130.
Jarvenpaa, Varma: Saluto al la Festo: p. 6; Mi serĉas vin, ho mia fratino: p. 7.
Jordana, C. A.: El meu amic Carles Riba: p. 20.
Julivert, Maria: Historia anekdoto: p. 106.
Jung, Teo: La Pensoj de mia animo: p. 133.
Karnas, Julius: Kanto: p. 215.
Kilian, Theodor: Ĉu kulpo aŭ sorto: p. 290.
XVI Kataluna Esp. Kongreso: p. 2; Programo: p. 19, 33; Raporto: p. 49.
XVII Kataluna Esp. Kongreso: p. 113; Ripoll, la vila historia catalana: p. 83; Kongresaj informoj: p. 198, 212, 226; Programo: p. 213; Raporto: p. 241.

- XVIII Kataluna Esp. Kongreso: p. 283.
- Lubjanovskij, Ivan: En maja tago: p. 148.
- M.: El Katalunujo al Kolonjo: p. 13.
- Minor, Karl: Edziĝo junaga — neniam domaĝa: p. 154; La Veto: p. 183.
- Montserrat, F.: Esperanta Libro-loterio: p. 98.
- Nekrologo: p. 32, 44, 98, 143, 192, 224, 285.
- Osmond, Emma L.: Esperanto kaj la naciaj lingvoj: p. 107; Kiel oni faras bonstilan tradukon: p. 157.
- Redakcio: Per l'enfortiment del nostre moviment: p. 1; Radio Associació de Catalunya i la F. E. C.: p. 17; Els cursos Cseh a Catalunya: p. 29; Vendrell atendas vin: p. 33; Iom pri Vendrell: p. 34; Esp. kaj la gazetaro: p. 48; Després de les paraules venen els fets: p. 81; Klarigo: p. 91; L'Esperanto marxa: p. 97; Per una tasca efectiva: p. 145; Ni ne haltos: p. 161; Oficiala angulo: p. 177, 193, 281; Sur vojo de sukceso: p. 209; Ripoll atendas vin: p. 225; Post Ripoll, Manresa: p. 262.
- Ripoll kaj ĝiaj monumentoj: p. 231.
- Roca i Rodó, Samuel: Un greu error: p. 195; La vortoj «ans-tataŭ» kaj «krom»: p. 259; Pri infinitivo kaj participo: p. 287.
- Schoor, Jan van: Kontraŭmilitema Kanto: p. 124.
- Schöttl, Maria: Ludwig van Beethoven: p. 185; Sankta Francisko kaj la lupoj: p. 216.
- Solà, Marian: XXVII Universala Kongreso de Esp.: p. 271.
- Swietoszewski, Robert: Nur Ami: p. 56.
- Ŝapiro, Jakobo: La Eterna Amo: p. 107.
- XXV Universala Kongreso de Esperanto: p. 15.
- XXVI Universala Kongreso de Esperanto: p. 103, 122.
- XXVII Universala Kongreso de Esperanto: p. 199; Nia 27-a, ĉu nura festo?: p. 222.
- XXVIII Universala Kongreso de Esperanto: p. 284.
- Vuille, Madeleine (Mad Mevo): Mia Amo: p. 247; Al la Int. Floraj Ludoj en Ripoll: p. 254.
- Weinstein, Halina: Leo Belmont kaj lia duonjarcenta literatura agado: p. 201; Ho, se nur tio estus la vero, La Amikino, Vortludo, Vespero (trad. el Leo Belmont), p. 203.
- Zamenhofaj Vortoj: p. 124.

—Ne, lasu ŝin, ŝi iru. Kiu gajnos la unuan batalon, estos estro dum la tuta edzeco. Ŝi iru, ŝi tranoktos ĉe sia panjo kaj pente revenos morgaŭ al vi, konsilis dua voĉo.

Li ekmarŝis hejmen kun malplena koro kaj kapo. For estis lia vivoĝojo, detruitaj liaj revoj, griza la vivo...

—Ne, morgaŭ mi iros nenien.

Sed en la oreloj de Anjuta ankoraŭ eĥis lia kolerega «mi iros» kaj denove ŝi vidis la minacantan kaj falantan pugnon. Ŝi devis pensi pri Katja, la servistino de ŝia panjo, kiu ĝemetis kaj sekrete ploretis, ĉar ŝia edzo ne plu amis ŝin. De kie vi scias, ke li ne plu amas vin? Ŝi foje demandis la virinon. La respondo surprizis ŝin: Ĉar li ne plu... batas min.

Ŝi ekstaris antaŭ lumigita enirejo. Iom konfuzita ŝi ekrigardis: Oficejo de l' Sekreta Polico. Subita pensero trakuris ŝian kapon:

—Tamen li ne iros, kaj ŝi eksonorigis. Post momento ŝi troviĝis en deĵora ĉambro. Post skribotablo dudekjara junulo.

—Mi venis, por sciigi al vi, ke mia edzo estas kontraŭrevolu-ciulo... cara oficiro kaj poste oficiro de Kolĉak...

La junulo ion demandis, ŝi respondis... du-tri demandoj, du-tri respondoj. Poste ŝi ion subskribis. Kaj jen, ŝi denove estis sur la strato. Ĉio ĉi okazis kvazaŭ ĝenita de araneaĵo teksita el ŝiaj konfuzaj pensoj kaj sentoj. Ŝiaj paŝoj direktiĝis hejmen. Ŝi ne plu sentis ĵaluzon kaj mirinde! nek amon. Restis nur aŭtomato, en kies cerbo ne vivas penso, en kies koro ne hejmas sento. Estis meznokto. De malproksime ŝi ekvidis tri virojn. Ŝi evitis renkonti ilin kaj kaŝiĝis en ombro de pordo-angulo. La meza kun klinita kapo estis ŝia edzo, akompanata de sekretaj policianoj. Li ne rimarkis ŝin. Anjuta rigardis lin, kiel oni rigardas fremdan homon, kiun oni neniam vidis antaŭe. Ŝi miris, ke eĉ la konscienco ne riproĉis ŝin... io ĝesis funkci en ŝi. Ŝi ne iris hejmen, ŝi timis la hejmon sen li. Ŝi vagadis tra la senhomaj stratoj kaj stratetoj sentante nek malvarmon nek lacecon: ne ŝi ja vagadis tra la stratoj, sed ia ombro de ŝi.

THEODOR KILIAN

(Daŭrigota.)

BIBLIOGRAFIO

Marx kaj Engels pri religio. — Verkita de A. T. Lukaĉevskij. Eldonita de Centra Konsilantaro de Unio de Militantaj Ateistoj en U. S. S. R. Moskvo. Ogiz-Gaiz, 1933.

Interesege 32 paĝa broŝuro, kies atenta legado estas tre instrua. Ĝi skizas la penson de Marx kaj Engels pri religio, kaj prezentas komparojn je aliaj aŭtoroj. Tre lerte oni traktas, en diversaj lokoj, pri primitiva religio, fetiĉismo, totemismo kaj animismo.

Komence de la broŝuro troviĝas — kvazaŭ moto — ĉi tiuj trafikaj vortoj de Lenin:

«Ĉiujn modernajn religiojn kaj ekleziojn, ĉiujn kaj ĉiajn religiajn organizojn la marksismo rigardas ĉiam, kiel organojn de burĝa reakcio, servantajn por defendo de la ekspluatado kaj stultigo de laborista klaso.»

Jen aliaj karakterizaj frazoj:

«La fino de religio venos nur tiam, kiam ruinfalos la sociordo, kiu estas bazo por religio.»

«Marx kaj Engels vidis, kiom grandega kontraŭrevolucia forto estas la religio. Jen kial ili dum tuta vivo batalis nelacigeble kontraŭ ĝi.»

«La marksismo estas la militanta ateismo.»

Aludante al la frapo direktita de Marx kontraŭ Hegel kaj Feuerbach, la aŭtoro akcentas:

«Ne sufiĉas diri, ke la homo kreas religion. Necesas kompreni, kio estas la homo.»

Kaj li prezentas difinon de Marx:

«La homo estas ne abstrakta, ekster la mondo ŝvebanta estaĵo. La homo estas LA MONDO DE L'HOMO, regno, socio.»

Aludante la «spiritan» rolon de religioj, la aŭtoro diras:

«La religio sanktigas kaj benas klasan malegalrajtecon, sklavecon kaj ekspluaton. La religio ne kondukas al liberigo de laborulamasoj, sed kondukas al fikso de l'sklaveco.»

«Hartwig en kelkaj broŝuroj («Jesuo aŭ Karl Marx», «Dio kaj finjuĝo») antaŭmetas la tezon pri tio, ke «la vojo al socialismo kuŝas trans ruinoj de l'eklezio», «por rompi la klasregadon necesas luktovenki religiajn superstiĉojn». El tio estas farata konkludo: antaŭe oni devas disvolvi antireligian propagandon kaj neniigi religion, kaj nur poste komenci la revolucion. Kaj ĉi tiu cinika trivialigo de l' marksismo estas ŝajnigata kiel marksismaj principoj.»

La aŭtoro asertas, post tio, ke marksistoj ne devas batali ekskluzive kontraŭ religio. Evidente, sed — diras ni — samtempe batalante kontraŭ kapitalisma sociordo, ni ne forgesu kontraŭreligian batalon.

Ja ni legas, iom pli poste:

«Kun malaperintaj sociaj kaŭzoj, naskantaj la religion, devas malaperi ankaŭ la religio mem.»

Kamarado Lukaĉevskij prave vidigas la eraron de tiuj, kiuj komparas komunismon al kristanismo:

«Nenion komunan ĝi havas kun la revoluciemo. «Sociaj principoj de l' kristanismo laŭdegas malkuraĝon, malrespekton al si mem, sinmaldignigon, obeemon, humilecon», «sur sociaj principoj de l' kristanismo kuŝas sigelo de l' ruzeco kaj bigoteco». Marx malkaŝas plej senindulge ekspluatatan esencon de l' kristanismo, praviganta la ekspluaton kaj perforton, sanktiganta la klasan socistrukturon, forloganta laborulamasojn per promesoj de paradizaj feliĉoj for de revolucia batalo.»

«Plu Marx indikas, ke la kristanismo pravigis la antikvan sklavecon, same, kiel laŭdegis ankaŭ la mezepokan servutecon.»

Ankaŭ Engels skeptike rilatas al ĉi tiu legendo kaj rekte deklaras, ke nur pro malscio oni povas diri, ke la kristanismo estas komunismo. Inverse, la kristanismo, kiel la tuta biblio ankaŭ, estas tute malamika al la komunismo.»

«Marx kaj Engels ne rifuzas tiun fakton, ke en la antikva kristanismo estas prediko de amo al homoj; ili eĉ diras, ke ĉi tiu prediko «estas unu el la fontoj, el kiuj devenis ideoj pri sociaj reformoj «Estas konate, ke ĉiuj antaŭaj kaj multaj modernaj sociaj aspiroj havis kristanisman, religiecan koloron: la amregno estis predikata kiel malaja al malbonega efektivo, kiel malaja al malamo.»

Ni legas ĉe Engels:

«La historio pri la unua epoko de l' kristanismo havas multajn karakterajn kontaktiĝpunktojn kun la moderna laborista movado. Kiel la lasta, same ankaŭ la kristanismo komence estis la movado de subpremitoj, ĝi estis kiel religio de sklavoj kaj liberforlasitaj, de malriĉaj kaj senrajtaj, de venkitaj aŭ subpremitaj de Romo popoloj. Ambaŭ, la kristanismo kaj la proleta socialismo, predikas venontan savon je sklaveco kaj mizero; la kristanismo transportas ĉi tiun liberigon en «transan» vivon post la morto, sur ĉielon; sed la socialismo ĝin vidas en ĉi tiu mondo, en rearanĝo de l' socio.»

La donitaj fragmentoj plene sufiĉas por informi pri la karaktero de la verko. — J. G. C.

Kontraŭ la regantaj perceptoj pri krimo kaj puno. — Verkita de Doktorino Klara Meyer-Wichmann. El la nederlanda lingvo tradukita de Nikune. Eldonis «Komitato por Agado kontraŭ la regantaj Perceptoj pri Krimo kaj Puno», sekretario H. Philips, Olympiaweg, 56, Amsterdam-Z., Nederlando. Prezo por 10 ekzempleroj: 1 svisa franko aŭ egalvaloro.

Broŝuro 8-paĝa, kiu kontraŭbatalas la punsistemojn ankoraŭ regantajn ĝe ŝtatoj, kiuj sin diras «civilizitaj».

Jen kelkaj fragmentoj:

«La bruteco de la puno ne sole konsistas en tio, ke socia ordo, kiu mem konstante kreadas la kondiĉojn por krimo, kiu mem (en formo de milito kaj ekonomia ekspluatado), sankciadas la krimon po-grandan, minacas kaj punas tiujn, kiuj atencas ĝiajn interesojn.

La bruteco ankaŭ konsistas en la maniero de reagado mem.

Ni nun memoru tiujn krimulojn, kiuj laŭdire efektive bezonas korektadon. Kion do puno efikas kontraŭ ili?

La puno animprenas ilin, humiligas ilin, forprenas de ili la lastan reston de rezistpovo.»

«Fakte ankoraŭ nun oni ne traktas la krimulon kiel Homon, sed oni traktas lin kaj enŝlosas lin kiel objekton. Ĉio, kio meritas la nomon hominda, estas rifuzata al li en la malliberejo; oni nur vivtenas lin. Li eĉ ne havas la eblon, efektivigi siajn plej bonajn intencojn; kaj tial korektado de la krimulo pere de la malliberejo estas neebbla. La malliberejo ne povas korekti.

»Estas ĝuste tiu ĉi primitiva principo, radikanta en venginstinktoj, kiu devas esti renversata. Kaj tiel ni ne nur direktas nin kontraŭ la eksceso de la ĉelsistemo, nek kontraŭ la ĉelsistemo mem, pri kies netolerindeco kaj nedezirindeco ni estas profunde konvinkitaj, nek eĉ kontraŭ nia nuna punsistemo kiel tuto; ni batalas kontraŭ tiu tuta punkoncepto mem.

»Kontraŭ tiu malnova, pratempa doktrino, datiĝanta de la komencepoko de la homaro, ke malbono estu repagata per malbono, kaj ke la malbonfarinton oni devas subpremi kaj humiliĝi, ni metas alian vivprincipon: Ne juĝu. Ne repaĝigu. Ne punu. Ne rekompencu. Sed, per ĉiuj viaj fortoj, klopodu krei efektive humanan socion, en kiu ekzistos por ĉiu homo la kondiĉoj por kreskado kaj disvolvigo; kaj klopodu, tiel en vi mem kiel en aliaj, venki la malbonon per la bo-

no. Nur nerekte oni povas kontraŭbatali la krimon; ne per peniigado de fortoj, sed per vekado de fortoj; per tio, ke oni igas konstrua tion, kio komence estis detrua.» — J. G. C.

Gramàtiche, Vocabolari ed Esercicis, di lenghe internacjonal Esperanto, pa-i ladins F urlàns. — Jen nova disvastigilo de Dott. A. Tellini pri la internacia lingvo, kiu samtempe konigas al ni la friulan idiomon, en kiu nia eminenta samideano (A. Tellini, Udine, placo Vitt. Emm. 9 A, Italujo)) sendos donace broŝurojn, gazetojn, kalendarojn al interesigintoj pri ĝi, kiu estas tre parenca al la kataluna. Ni gratulas Doktoron Tellini por lia malavara kaj nobla agado. — D. G.

E. Drezèn.—Pri internaciigo de scienc-tek-nika terminaro. — Eld. de Standartgiz kaj «Ekrelo»; Moskvo kaj Amsterdam, 1935.

Jen broŝuro tre interesa por sciencistoj. Ĝi enhavas dokumentitan historion kaj eldiron pri la nuna stato kaj perspektivoj de tiu grava afero; raporton akceptitan de la Komisiono por Teknika terminologio ĉe Sovetunia Akademio de sciencoj kaj de la Konferenco de I. S. A. (Internacia Asocio de Normig-Asocioj) en Stockholm, 1934.

La verkaĵo de nia klera samideano el Sovetunio estas vere scienca. Ĝi estas rekomendinda por la stilo en Esperanto, pro la graveco de la temo kaj pro kompetenteco de la aŭtoro.

Por ni katalunoj estas speciale interesa cito: «La principo de interpopola egalrajto postulas ĉe starigo de ĝenerale akceptota internacia lingvo plenumon de Lenina tezo: «absolute neniamajn privilegiojn al iu nacio aŭ lingvo». (Lenin-Verkaro, II^a rusa eldono, vol. XVII, paĝo 135.)» — D. G.

Esperantaj Historietoj I., de Peter Frey. Danlando. Formato 13,5+19 cm. 47 paĝa. Luksa papero. Bele broŝurita. Prezo: pesetoj, 1'80. La libro havas pedagogian celon. Ĝi enhavas nur rakontetojn, kiuj povas samtempe amuzi kaj distri, sed antaŭ ĝio ankaŭ instrui. La lingvo estas altnivela, bona, simpla kaj ĉiu kursĉeestinto povas legi ĝin. Post la apero de «Unua Legolibro» de Dro. Kabe nur aperis malmultaj tiaj libroj, kiuj povos same bone enkonduki la komencantojn en la literaturon Esperantan, kiu por ili ofte estas iom tro malfacila en la komenco. La rakontetoj estas mallongaj kaj povas helpi vigligi la kurs- kaj societvesperojn. Ni espe-

ras, ke la libro povos esti daŭrigota en aliaj, kiel montras la cifero I. La libron ni povas rekomendi al ĉiuj.

Reprezentanto por Hispanujo: Iberia Esperanto-Servo, strato Provenza, 75, 2.^o, 3.^a, Barcelona. — Neniu.

Esperantaj Historietoj. — Peter Frey, aŭtoro kaj eldoninto. Clausensvej, 26. Haderslev. Danlando. Poŝtkonto 42966. Formato de la libro 13'5+19'5 cm. 48 paĝa. Luksa papero. Broŝurita. Prezo: 35 ned. cend. — Jen bona verketo por praktikado kaj praktikigado en kursoj, ĉar ĝi konsistas el interesaj mallongaj historietoj, klarstilaj, lingvokorektaj, vere modelaj kaj taŭgaj por tiu celo.

Kial la aŭtoro ne aldonis post ĉiu historieto, demandaron pri la enhavo por interparolo plej fidela kaj detala? Tio multe helpas la taskon de kursgvidantoj, kaj faciligas la lernadon kaj memorigon de vortoj kaj frazoj. — Delfí Dalmau.

Pasko. — Dramo en tri aktoj, de August Strindberg. El la sveda tradukis Stellan Engholm. — Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 88 paĝ. Prezo: sved. kr. 1,50.

Dum la 26 Universala Esperantokongreso en Stockholm teatra grupo sub gvidado de reĝisoro Sandro Malmqvist ludis unuaktan dramon. Ludi kun fajro, de August Strindberg, la plej granda sveda verkisto. La prezentado estis multe laŭdata ne nur de la esperantistoj, sed ankaŭ de la profesiaj kritikistoj de la grandaj stockholmaj ĵurnaloj, kiuj estas tre severaj en siaj prijuĝoj.

Nun s-ro. Malmqvist ĵus entreprenis vojaĝon tra la baltaj landoj prezentante, krom la dramo jam menciita, la triaktan dramon «Pasko» de la sama aŭtoro. La geaktoroj rikoltis grandan laŭdon. La tradukon faris s-ro. Stellan Engholm, kies nomo estas tre bone konata tra la mondo kiel pro lia majstra traduko de la grandega verko «Gösta Berling» kiel ankaŭ pro liaj originalaj verkoj, el kiuj la debutromano «Al Torento» jam aperis en dua eldono. «Pasko» estas unu el la plej konataj kaj ŝatataj dramoj de Strindberg, multfoje prezentita en Svedujo kaj ankaŭ en aliaj landoj.

La libro prezentigas en bela eksterajo kaj preso.—Neniu.

Ferenc Szilágyi: Dr. Szilágyi's Kurs i Esperanto. — Eld. Soc. Esperanto, Stockholm, 96+4 paĝoj. Prezo 2 sved. kr.

La aŭtoro, kiu dum sia dujara instruado en Svedlando akiris al si grandan popularecon per sia originala, t. n. projekcia, metodo (kun lumbildoj), nun aperigis Esperanto-kurson

en libroformo. La belaspekta, 206 unuarangajn ilustraĵojn enhavanta libro ne sekvas tute la antaŭajn bildmetodojn, sed montras tute originalajn pedagogiajn vidpunktojn, kiujn bonege apogas la «dramece» karikaturaj, ridigaj ilustraĵoj, speciale la tutmonde popularaj Adamson-serioj; en la bildoj la agado estas tiom koncentrita kaj frapanta, ke ili vere riĉigas la memoron de la lernanto — kaj plej ofte per verboj, kies gravecon la aŭtoro ne mistaksas.

La unua faktoro nepre necesa por kapti kaj konservi la intereson de la komencantoj estas, en la plej multaj okazoj, simpla instrumetodo kio ne superas la kapablon de la lernantoj, kaj en la libro aperinta la aŭtoro plene atentis tiun postulon. Entute oni povas diri, ke la libro tuj vekas kaj konservas la intereson ĝis la fino, kie bone elektitaj literaturaĵoj, tabeloj, vortaro kompletigas la plezuron de la komencanto, aŭ eĉ — komencinto.

Al ĉiu leciono apartenas mallongaj gramatikaj klarigoj en sveda lingvo. Tiuj klarigojn alilingva instruisto facile povas verki en sia propra lingvo. — Neniu.

ENLANDA MOVADO

Barcelona. — En la sidejo de Cooperació Integral Obrera, str. Barra de Ferro, 4, komenciĝis sub la gvido de samideano José Roche nova kurso de esperanto. Aliĝis kelkaj lernantoj, kiuj kun entuziasmo partoprenas la kurson.

—La societo «Nova Sento» daŭrigas kun sukceso sian por-esperantan laboron kaj ĝiaj kunvenoj estas tre ĉeestataj. La 22-an de januaro okazis la laŭstatuta kunsido kaj la nova komitato de la societo fervore preparas novajn kursojn kaj vastan propagandon.

—«Paco kaj Amo», la plej malnova esperanto-societo en Barcelona, havis sian ĝeneralan kunsidon la 12-an de januaro. Regis granda entuziasmo kaj la multnombra ĉeestantaro decidis daŭrigi la vastan taskon, kiun ĉiunoktage disvolvis la plej laborema enurba grupo. Nova kurso estas en preparo. La samideanoj estas petataj viziti la ĉiujn kunvenojn, vespere de la sepa ĝis la naŭa.

—En la sidejo de «Paco kaj Amo» kaj sub la organizo de K. E. F. la 15-an de decembro okazis la konata Festo de la

Libro. Partoprenis multaj geesperantistoj el diversaj grupoj kaj oni disvendis multajn librojn. Paroladis pri diversaj aspektoj de nia movado kaj pri la ĝenia aŭtoro de esperanto s-noj S. Alberic Jofrè, Arturo Lewin, Paul Prabucki kaj Jaume Grau Casas.

—La Proleta Grupo de Esperanto Juneco invitas ĉiujn esperantistojn partopreni la «babiladojn», kiuj okazas ĉiumarde de la 9-a ĝis la 10-a.

—La direktoro de Akademia Cots, sro. Antoni Cots, mortis lastatempe. Sro. Cots estis bona amiko de nia afero kaj en diversaj okazoj helpis nian movadon. Ni esprimas al lia familio nian kondolencon.

—Ni ricevis por publikigo la sekvantan noton: «Kunsido de membroj de H. E. A.—En la kunsido de membroj de Hispana Esperanto-Asocio okazinta la 28-an de januaro post alvoko al ĉiuj katalunaj membroj de la nomita asocio, oni aprobis unuanime la sekvantajn punktojn: elekti kiel regionajn delegitojn sinjorojn Vicenç Marin, Josep Garganta kaj Josep Banet kaj ne okazigi la anoncitan XI Kongreson de H. E. A. en Barcelona».

Ni sincere gratulas la kunvenintojn, kiuj alprenis tiel saĝajn decidojn kaj per tio pruvis, ke ne en ĉiu kapo mankas klapo.

Kurso de Esperanto en «AGEA» (Associació General d'Empleats d'Assegurances), Portaferriŝa, 30, principal, Barcelona, dank' al la klopodoj de amiko Rafael Gisbert, okazis dum la lastaj novembro, decembro kaj januaro kurso de Esperanto, kiu estis gvidata de nia Lingva-Komitatano Jaume Grau Casas.

Antaŭ la kurso okazis propaganda parolado, kaj la bulteno de la societo aperigis poresperantan artikolon.

Alia kurso por poŝtistoj. — Gvidata ankaŭ de nia amiko Grau Casas, okazas kurso de Esperanto por poŝtistoj en Barcelono, ĉe strato Ample, 1.

Esperantistoj:

dum Pentekosto al Manresa!

Curs Complet de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

per **Jaume Grau Casas**

*La millor gramàtica en català
de la llengua Esperanto. Em-
pren-la en tots els curssets!*

Preu: 3'50 pessetes

Adrecen-vos a la Redacció de "Kataluna Esperantisto"

Dank'al la klopodoj de
**Kataluna Esperan-
tista Federacio**, aperis
jam tri serioj de bild-
kartoj kun teksto en
esperanto.

Aperis jam serioj, de

**TARRAGONA
PALMA DE MALLORCA
BARCELONA**

ELDONITAJ DE LA FAMA

ZERKOWITZ

K. E. F. povas ilin havigi
al vi je tre favoraj prezoj.

Mendu tuj!

ESTATUTS DE LA FEDERACIÓ ESPERANTISTA CATALANA

Art. 1. L'agrupació general d'esperantistes en terres de llengua catalana, es dirà FEDERACIÓ ESPERANTISTA CATALANA, i, en esperanto, KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO (K. E. F.).

Art. 2. La finalitat de la Federació Esperantista Catalana, és la unió d'entitats i individus esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, i, també, donar compliment als acords i Consells que afectin la collectivitat, procedents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directores de la llengua del doctor Zamenhof.

La Federació Esperantista Catalana, sempre que les circumstàncies econòmiques li ho permetin, s'adherirà, pagant la quota corresponent, a la «Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj».

Art. 3. La Federació Esperantista Catalana estarà integrada de membres actius i protectors.

Per a la classificació dels actius, caldrà tenir en compte el que se segueix:

Els socis actius seran dividits en socis collectius i individuals.

Els socis actius pagaran, per mitjà de l'entitat llur i per cadascun dels socis que aquesta tingui, una quota de 0,30 ptes. trimestrals.

Els socis individuals que acreditin pertànyer a una entitat esperantista, no adherida a la Federació, pagaran solament una quota de 1'20 ptes. anuals.

Els socis individuals pagaran una quota de dues pessetes amb cinquanta cèntims anyals.

Els socis protectors (individus o entitats), pagaran una quota de 12 ptes. anuals com a mínimum (1).

Art. 4. La Federació Esperantista Catalana, estarà regida per una Junta renovable cada any, composta de: President, vice-President, Secretari, vice-Secretari, Caixaer, Comptador, Bibliotecari i dos vocals.

Art. 5. La Junta de la Federació Esperantista Catalana convocarà, almenys un cop cada any, si és possible en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, els seus associats en Assemblea o Congrés general, en el qual, previ l'ordre del dia, es donarà compte als federats dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant el temps del seu exercici; serà acordat, si és possible, el lloc on s'haurà de celebrar el pròxim Congrés o Assemblea; seran nomenats els individus que hauran de formar part de la Junta per al següent exercici i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades 30 dies abans del Congrés o Assemblea, i, si és possible, que hagin estat publicades a la revista i incloses en l'ordre del dia.

Art. 6. La Junta permetrà la constitució de seccions dintre de la Federació.

Aquestes seccions, que podran ésser de caràcter ben autònom, hauran de regir-se per un Reglament interior en el qual siguin cedits, com a mínimum, dos càrrecs, en els corresponents Comitès de Secció, al Comitè Directiu de la Federació.

Art. 7. Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria de vots dels socis assistents. Les modificacions que puguin ésser presentades a aquest Reglament, hauran d'ésser-ho amb l'antelació deguda a fi d'incloure-les en l'ordre del dia i estar publicades en la seva totalitat, puix que solament podran ésser discutides i estudiades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. 8. Tots els socis actius, individuals o collectius, tindran veu i vot en les Assemblees o Congressos generals on assisteixen.

Art. 9. Aquesta Federació Esperantista Catalana podrà actuar mentre tingui adherides dues entitats o 30 membres individuals. En cas de dissolució, previ acord de la Federació Esperantista Catalana, els fons existents o que resultin de la liquidació, passaran a la «Internacia Centra Komitato de la Esperanto Movado» domiciliada a Ginebra, per a la propaganda de l'Esperanto. Si aquesta entitat central no existia en els moments de la dissolució, podrà, la Junta General de socis, acordar la destinació dels fons i objectes en existència.

Article transitori. La Federació Esperantista Catalana estarà domiciliada a Barcelona, carrer València, 245, entresol.

Barcelona, 6 d'agost del 1930.

(1) Tots els socis pagaran a més ptes. 125 anuals per la quota d'U. E. A.